**2025.3.2 Francio**
Kara amiko,
Ankaŭ mi timas.
Eŭropa Unio certe helpos Ukrainion.
Probable Britio, Kanado kaj aliaj ankaŭ helpos.
Kaj Japanio? Ĉu vi aŭskultas, kion pensas la japana registaro pri tiu grava afero?
Plej amike  Telemo

2025. 3. 2 フランス 親愛なる友人、 私も怖いです。 欧州連合は間違いなくウクライナを支援するだろう。 英国、カナダなどもおそらく協力するだろう。そして日本は？この重要な問題について日本政府がどう考えているか聞いていますか? よろしくお願いいたします、テレモ

**Respondo de Hori**
La japana konstitucio malpermesas militadon, tial ne povas helpi Ukrainion per armiloj, sed per aliaj rimedoj humane, sendante diversajn mas^inojn kaj aparatojn. Japanio akceptis 3000 fuĝintojn el Ukrainio.
堀さんの答え
日本国憲法は戦争を禁じているため、武器でウクライナを支援することはできないが、さまざまな機械や装置を送るなど人道的な手段で支援している。日本はウクライナからの難民 3, 000 人を受け入れた。

**Belgio**
Timo neniam estis Bona konsulisto.
Tamen pruvas vian vivdeziron.
Alessandro la granda semis chien sur la Mondo..do idoj chiam venos...
Mondo ghis nun travivis
Esperon neniam forlasu!
Knufle
ベルギー 恐怖は決して良い助言者ではない。 しかし、それはあなたの生きる意志を証明するものです。 アレクサンダー大王は世界に種を蒔きました... だから子孫は常に生まれます... 世界はこれまで生き残ってきた 決して希望を捨てないでください！ スナッフル

Eble legu la historion de Alessandro la Granda..
Multe da "mondgvidantoj" havas tion Saman malsanon totalpovhavdeziron.
Kompatinta Mondo, chu?
Knufle
アレクサンダー大王の物語を読んでみてはいかがでしょうか。 多くの「世界の指導者」は、完全な権力への欲求という同じ病気を抱えています。 貧しい世界ですね？ スナッフル
2025.3.3 Hungario

ESTIMATA SINJORO HORI SAN,
ANTAŬ KELKMINUTOJ MI SENDIS AL VI NEFINITAN LETERON, KIUN MI SENDIS AL VI hazarde, ne pripensite. Pri la Afrikaj kaj la israelaj militaferoj mi ne povas esti bonbaze pensanta, eĉ tion m ne scias ĉu ne estus pli bona, se ankaŭ palestinoj havus propran landon? Mi nenion scias, diversmaniere mi opinias legante la diversajn novĵojn, KVANKAM MI BEDAŬRAS ĈIUN SUFERANTON KIE AJN VIVU TIU EN LA MONDO.

NIN TERANOJN ATINGAS MULTAJ NATURAJ KATASTROFOJ KIUJ EGE MULTEKOSAS POR LA TIUREGIONE VIVANTOJ. kIAL MILITI KROME?cXU NE ESTUS PLI BONE DISDIVIDI LA NATURAJN VALORAĴOJN INTER LA POPOLOJ, ke ĉiuj havu el ĝi laŭ sia bezono, sed aliru ĝin ne militante dum kio tiu murdas homojn, neniigas teritoriojn. Se Ukrainio povus ligi kontraktojn kun Usono, Rusujo ka EU, ke si mem vendos la bezonatajn mineralojn volonte al tiuj se ili volas pagi , certe bonos, kaj ĉuj vidus pli volonte ĝin, ja ĝi estus saĝa GRANDPOTENCA STATO pro la grandeco de la lando kaj la subternivelaj teraj valoraĵoj , SED NE VOLU ESTI LA ESTRO DE EUROPO KAJ TOLERU LA ALINACIANOJN, KIUJ KAJ KIES ANTAŬULOJ SAME VIVAS TIUTERITORIE EKDE EBLE MIL JAROJ. LA POTENCAJ LANDOJ ELUZOS ĈION EBLAN. UkRAINIO HAVA CX. 40 MILIONOJN DA HOMOJ, DUM LA MILITO la lando PERDIS ĉirkaŭ 800 MILOJN, DO LA LANDO HAVAS UKRANOJN SUDFICXE MULTE POR MILITI, TAMEN, LA ESTRO VOLAS ALILANDAJN SOLDATOJN POR IRI MILITI al ili, KE DE ILI JAM NE FALU PLI MULTE. CXU VI NE PENSAs tion, kiom ajn homoj mortas, tiuj estas tamen multaj mortfali por alies interesoj kaj lasi orfojn hejme? Paco estus jam bezonata, sed ĝin la batalantoj kaj ĝiaj subtenantoj ŝajne ne volas fidante nur en fortoj de la armiloj.

Laŭ vi kiu venu do konvnki ilin, ke ili povu klini sin al la paco?

Pripensu ANKAŬ tion, se nun Cxinio (ne pro la ekkono de  la luna mondo scenconivele)sed eluzi la mineralenhavaĵojn, ĜI NE POVOS RESTI samloke, ĝi perdos sian lokon en la universo, pro la perdo de sia enhavaĵoj, ĝi plifaciliĝos kaj tiel perdos ĜIAN LOKON EN LA Spaco,kaj tiel la interspaca distanco inter la Luno kaj la TERO povos pligrandíĝi. Foriĝus de ni la Luno, pere de kio multaj favoraj naturaj fenomenoj malaperos de la Tero.

Ĉu ne estus bone magrandigi la mineralsoifojn de la grandpotencaj landoj por resti teranoj kaj ne nenigi la teran vivon?

Kun elkoraj salutoj

Adri Pásztor el Miskolc, Hungarujo

2025. 3. 3 ハンガリー 拝啓 堀さん

アフリカとイスラエルの軍事問題についてはよく考えられない。パレスチナ人も自分たちの国を持ったほうが良いのではないか、とさえ思う。私は何も知りません。さまざまなニュースを読むと、世界のどこに住んでいても苦しんでいるすべての人に対して同情を感じますが、違った考えを持っています。

私たち地球人は、この地域に住む人々に大きな被害をもたらす多くの自然災害の影響を受けています。なぜ戦争をするのでしょうか? 人々を殺し、領土を破壊する戦争をせずに、誰もが必要に応じて天然資源を利用できるように、天然資源を人々の間で共有する方がよいのではないでしょうか。もしウクライナが、米国、ロシア、EU と契約を結び、彼らが支払いに応じるなら、必要な鉱物を喜んで販売することができれば、それは確かに良いことであり、彼らもそれをより喜んで受け入れるだろう。実際、国土の広さと地下資源を考えると、ウクライナは賢明な大国となるだろう。

しかし、ウクライナは、ヨーロッパのリーダーでありたいとは思っておらず、この地域におそらく千年もの間住んでいる異星人やその先祖を容認したいわけではない。強国はあらゆる手段を講じるだろう。ウクライナには CX があります。人口は 4000 万人で、戦争中に国は約 80 万人を失いました。そのため、この国には南部に戦うウクライナ人が大勢いますが、指導者は、これ以上ウクライナ人が倒れないように、外国の兵士に一緒に戦ってほしいと考えています。どれだけ多くの人が死んでも、その多くは他人の利益のために死んで、孤児を家に残していくのだと思わないのですか?今こそ平和が必要だが、戦闘員とその支持者は明らかに平和を望んでおらず、武力だけに頼っている。

誰が彼らに平和に従うよう説得すべきだと思いますか? また、これを考慮してください。もし中国が現在(段階レベルでの月の世界の知識のためではなく)鉱物成分を使い果たした場合、それは同じ場所に留まることができなくなり、宇宙での場所を失います。その内容物の損失により、軽くなり、したがって宇宙での場所を失い、したがって月と地球の間の空間距離が増加する可能性があります。月は私たちから遠ざかり、地球上から多くの有益な自然現象が消えてしまうでしょう。 地球上の生命を破壊せずに地球人であり続けるために、大国の鉱物への渇望を軽減するのは良いことではないでしょうか?

よろしくお願いいたします。

ハンガリー、ミシュコルツ出身のアドリ・パストル

2025.3.3 Brazilo
Kara samideano,

La sekvo, pri kiu ankau mi timas, jen estas simpla:

la eŭropaj perdintoj, decidas ĉu ili ampleksigos . ne plu malrekte, sed per soldataroj - aŭ ne la militon kontraŭ Rusio. Rusio ne toleros faktajn NATO-armeojn en Ukrainio.

Dume, Usono forigas de si la perdo-etikedon kaj sin dediĉos alfronti la alian "malamikon", nome, Ĉinion.

Japanio, kiu kune kun Germanio, estas klare okupata lando, pretiĝos militi ĉu kontraŭ Ĉinio, ĉu kontraŭ Rusio, certe ne samtempe. Jes, denove.

Kiu profitos? Usono, ĉefe per vendo de armiloj, unue al tion urĝe bezonanta politikkaduka Eŭropo.

Rusio, Historio klare montras - ĉu jam 8-foje fiaske atakita de eŭropanoj - ke ĝi sukcesas rezisti kaj ... venki.

En tio Ukrainio politike plej stultas. Eŭropo, malprofite al siaj popoloj, sekvas histerion de baltaj land(et)oj, kiuj miskondutas kontraŭ siaj grandaj rusnaciaj minoritatoj.

Ĉu la cetera mondo pli facile spiros, ĉar eksterorbite? UN fariĝis, ho ve, kadavro. Espero naskiĝas per BRICS, do por multpolusa - nekontraŭusona! - mondo.

Ni ne perdu esperon: finfine ni sukcesis de ŝtonepoko ĝis la mirinda nuno. Ni nepre venkos stulton de ŝtoniĝinta politiko. Same kiel Esperanto venkos ŝtonepokan internacian komuniksistemon ;)

Drakoluiz

2025.3.3 ブラジル 親愛なる皆様、

私も恐れている結果は単純です。 ヨーロッパの敗者は、拡大するかどうかを決定します。もはや間接的ではなく、軍隊を通じて、あるいはむしろロシアとの戦争を通じてである。ロシアはウクライナにNATO軍が実際に駐留することを容認しないだろう。

一方、米国は敗者というレッテルを脱ぎ捨て、もう一つの「敵」、つまり中国と対決することに専念するだろう。

ドイツと並んで明らかに占領国となっている日本は、中国かロシアのどちらかと戦争する準備をするだろうが、もちろん同時にはそうはならないだろう。はい、でも再度。

誰が恩恵を受けるのでしょうか?米国は、主に武器の販売を通じて、何よりもまず、それを切実に必要としている政治的に衰退しつつあるヨーロッパに武器を販売している。

ロシアは、ヨーロッパ人による攻撃を8回受けて失敗したにもかかわらず、抵抗し、そして勝利を収めてきたことを歴史が明らかに示している。

ここがウクライナが政治的に最も愚かなところだ。ヨーロッパは、自国民に損害を与えながら、多数のロシア系少数民族に対して不適切な行動を取っているバルト諸国のヒステリーに倣っている。

軌道外宇宙のおかげで、世界の他の国々はより楽に呼吸できるようになるのでしょうか?悲しいかな、国連は死体と化した。 BRICSを通じて希望が生まれ、多極化、非反米化が進むでしょう。 – 世界。

希望を失わないでください。結局のところ、私たちは石器時代から素晴らしい現在まで成功してきたのです。我々は必ず、石化した政治の愚かさを打ち破ります。エスペラント語が石器時代の国際コミュニケーションシステムを打ち負かすのと同じように。 ドラコルイズ

**Rusio**

**Haltigu la mondmiliton (33-1) <originalo>**

*2-a de marto 2025*

Temo: La malfacileco diri sian opinion

Novaĵoj pri milito kaj paco antaŭeniris, sed je mia granda bedaŭro, la direkto kaŭzas al mi zorgojn.

1. Novaĵoj. Rusaj novaĵoj festas - Putin kaj Trump amikiĝis, kaj kune ili montros al eŭropaj landoj sian lokon. Sed la plej multaj el la rusoj ĉirkaŭ mi preferas ne paroli aŭ diskuti ajnajn politikajn novaĵojn, kaj bonajn kaj malbonajn (ĉar la tagordo rapide ŝanĝiĝas kaj la hieraŭa agreso kontraŭ Trump kaj Usono povas hodiaŭ rezultigi kriman persekuton).

Ordinaraj homoj opinias, ke la deklaroj de Trump donas esperon, ke Putin kaj liaj asistantoj ne estos punitaj, ke viroj ne estos enkondukitaj en militon, kaj ke ĉio povas esti forgesita por ĉiam. Tiaj ŝancoj estas perceptataj kiel eta festo, sed ĉiuj timas diskuti ĝin.

Ni silentas tra la tuta lando.

Ne, estas maloftaj kazoj: iu lernejano en la necesejo skribis pri subpremo, kaj la lernejestro skribis plendon kontraŭ li al la polico.

Mia amikino kaj ŝiaj amikoj foje ekskursas, kie ili parolas pri malliberejoj kaj politikaj malliberuloj de la sovetiaj jaroj – en la lastaj semajnoj skandalaj provokantoj klopodas alveni al la renkontiĝo.

Mi foje iras al novaj kunvenoj, kie estas multaj homoj nekonataj al mi. Kiam temas pri milito, estas malfacile por mi reteni min kaj silenti, mi pensas iam, ne baldaŭ, sed mi povos legi denuncojn pri mia konduto.

ロシア 世界戦争を止めよう（33-1）<原文> 2025 年 3 月 2 日

テーマ：自分の意見を表明することの難しさ

戦争と平和についてのニュースが進んでいますが、残念ながらその方向性が心配です。

1. ニュース。ロシアのニュースは祝賀ムードだ。プーチン大統領とトランプ大統領は友人となり、一緒にヨーロッパ諸国に自らの立場を示すことになるだろう。しかし、私の周りのロシア人のほとんどは、良いニュースも悪いニュースも含め、いかなる政治ニュースについても話したり議論したりすることを好まない（議題は急速に変化しており、昨日のトランプと米国に対する攻撃が今日刑事訴追につながる可能性があるため）。

一般の人々は、トランプ氏の発言によって、プーチン大統領とその側近が処罰されることはなく、人々が戦争に駆り立てられることもなく、すべてが永遠に忘れ去られるだろうという希望が生まれると信じている。このような機会はちょっとしたお祝いとして捉えられていますが、誰もがそれについて話し合うことを恐れています。

我々は全国で沈黙している。

いいえ、まれなケースもあります。男子生徒がトイレでいじめについて書いたところ、校長が警察に彼に対する告訴状を提出したのです。

私の友人とその友人たちは時々、ソ連時代の刑務所や政治犯について話し合う遠足に出かけるのですが、ここ数週間、スキャンダラスな挑発者たちがその会合に出席しようとしています。

私は知らない人がたくさんいる新しい会議に参加することもあります。戦争のこととなると、我慢して沈黙を守るのは私にとって難しいことですが、すぐにではないにしても、いつかは私の行為に対する非難を読むことができるようになると思います。

**Haltigu la mondmilitlon (33-2) <originalo>**

*2-a de marto 2025*

Temo: Nur surface gajaj festoj en Ruslando

2. Printempaj ferioj. Samtempe en Rusio okazas "festoj" unu post la alia - la 23-an de februaro, "Defendanto de la Patrujo", kiu iom post iom ŝanĝiĝis dum la jardekoj al seksa feriado por ĉiuj viroj. Tiam la 24-a de februaro estas la komenco de la "venka milito" (en la novaĵoj, trankvilaj junaj anoncistoj diras per memfida, paca voĉo, ke "rusaj trupoj atingas siajn celojn, protektas civilulojn kaj zorge traktas kaptitojn". Ĉi tio estas terura mensogo, sed la anoncistoj neniam vidis, kiel orkoj torturas kaj mortigas kaptitojn, la anoncistoj kredas je siaj vortoj, kaj post ili ankaŭ kredas la stulta viro surstrata..)

Hodiaŭ, sur nekutime granda skalo (ŝajne pro la kverelo inter Trump kaj Zelensky), Maslenitsa estis festita sur ĉiu angulo - ĉi tio estas duonpagana festo, kies atributoj inkluzivas manĝi patkukojn, rondajn dancojn kaj bruligi homgrandan pupon - figuro de vintro.

Mi ne ŝatas ĉi tiun feston, ĉar mi kredas, ke antaŭ kelkaj jarcentoj, sub la ŝajno de vintro, ili povis bruligi vivantajn homojn, plej ofte sorĉistinojn (en la rusa, la vortoj "scio" kaj "sorĉistino" havas la saman radikon, tio estas, inteligentaj virinoj kaj resanigantoj estis nomitaj sorĉistinoj). Ŝajnas al mi, ke miaj fratinoj en spirito povus esti forbruligitaj dum ĉi tiu festo, kaj tial mi ne ŝatas ĉi tiujn festojn.

Baldaŭ, la 8-an de marto, atendas nin alia "festo" - "la tago de solidareco de laboristinoj por siaj rajtoj", kiu ankaŭ estas rigardata en Rusio dum la lastaj jardekoj kiel seksa feriado al virinoj en ĉi tiu tago.

Plejparto de la rusa loĝantaro trinkas alkoholon en ĉi tiuj datoj, kaj la kvanto de agreso kaj neadekvateco pliiĝas.

世界戦争を止めよう（33-2）<原文> 2025 年 3 月 2 日

トピック：ロシアでは表面上だけ楽しい祝賀行事

2. 春休み。同時に、ロシアでは「祝賀行事」が次々と行われている。2 月 23 日の「祖国防衛者の日」は、数十年かけて徐々にすべての男性にとっての性的祝日へと変化してきた。そして 2 月 24 日は「勝利の戦争」の始まりです（ニュースでは、落ち着いた若いアナウンサーが自信に満ちた穏やかな声で「ロシア軍は目標を達成し、民間人を守り、捕虜を丁寧に扱っている」と伝えています。これはひどい嘘ですが、アナウンサーは捕虜を拷問し殺す様子を見たことがないため、アナウンサーは彼らの言葉を信じ、その後、

愚かな路上の人々も信じてしまいます...)。
今日、(明らかにトランプとゼレンスキーの不和のため)異常に大規模なマースレニツァがあらゆる場所で祝われました。これは半ば異教的な祝日で、パンケーキを食べ、輪になって踊り、冬の姿をした等身大の人形を燃やすことが特徴です。 私はこの祝日が好きではありません。なぜなら、数世紀前、冬を装って人々を生きたまま焼き殺すことがあったと信じているからです。その対象は主に魔女でした(ロシア語では、「知識」と「魔女」という言葉は同じ語源で、つまり、知的な女性や治療師は魔女と呼ばれていました)。私の魂の姉妹たちはこのパーティーで傷つけられるかもしれないと思うので、私はこういったパーティーが好きではありません。
まもなく、3月8日には、もう一つの「祝日」が私たちを待っています。それは「働く女性の権利のための連帯の日」であり、この日はロシアで過去数十年にわたり、女性のための性的祝日としても祝われてきました。
ロシア国民のほとんどはこれらの日々にアルコールを飲み、攻撃性と無能さが増すのです。

**Haltigu la mondmiliton (33-3) <originalo>**
*2-a de marto 2025*
Temo: Skandalo en Usono Ovala Oficejo: Ameriko nun similas al Ruslando antaŭ dek jaroj

3. Mi antaŭe havis plurajn homojn en mia rondo, kiuj, ŝajnas al mi, havis karakterojn similajn al la nunaj povomalsataj prezidantoj. Estis multe da profito de ĉi tiuj konatoj, sed ne estis malpli da damaĝo. Post miaj spertoj, mi provas ne proksimiĝi al homoj, kiuj havas pli da fiero ol amo por homoj. Mi scias, ke ili povas esti nekredeble efikaj kaj energiaj, sed iliaj agadoj devas plifortigi sian tujan famon aŭ senton de memgraveco (ĉu fakta aŭ fikcia). Pli aŭ malpli frue, la longperspektivaj interesoj de ilia teamo aŭ lando venas en konflikton kun la interesoj de tiaj narcisismaj homoj.

La estonteco de lando aŭ kolektivo ne dependas de tiaj homoj (ili ĉiam finfine strebas detrui ĉion, kion ili vidas); la estonteco de la lando dependas de kiel la sistemo estas konstruita kaj ĉu estas forta persono aŭ homoj en la socio, kiu estas preta konstruime kontraŭdiri la prezidanton.

Putin mortigis tiajn opoziciulojn en Rusio. Trump multrilate similas al Putin - li ankaŭ forte alkroĉiĝas al la potenco (kaj de la unuaj tagoj konfuzis lin la ebleco kandidatiĝi por tria oficperiodo), ankaŭ ne ŝatas la sendependan gazetaron, ankaŭ estas kruela al la sorto de migrantoj, ne scias kiel kompati homojn, kaj ankaŭ metas monon super homaj rilatoj. Kiam mi aŭskultas la hodiaŭajn novaĵojn pri Ameriko, mi havas senton de ja vu - ni ĉiuj travivis tion en Rusio antaŭ 10 jaroj: la persekutado de la gazetaro, kaj la reverkado de la leĝoj de la lando. Se Dio volas tiel ke mia opinio estas malĝusta.

Ŝajnas al mi, ke ambaŭ ĉi tiuj prezidantoj ne scias kiel kompati kun aliaj homoj, ne sentas doloron por la vivo de aliaj homoj. Mi ankaŭ kredas, ke ne estis inda amo en iliaj vivoj (multaj aspektoj, inkluzive de korpa lingvo, tio estas klare videbla), kaj ial iliaj edzinoj kaj amatinoj estas el la sfero de korpvendado - "modeloj", "aktorinoj", "atletoj" kaj unu stevardino)).

Mi pensas multe pli bone pri Vladimir Zelenskij. Sed kiam mi demandis mian ukrainan amikon, ĉu Zelenskij vere havas nur 4% de la voĉoj en Ukrainio, ŝi respondis necerte, ke verŝajne 30-50-70 procentoj tute fidas lin. Ŝi komunikas kun multaj malgrandaj entreprenistoj - ili estas tre ĉagrenitaj pri subaĉetaĵoj, korupto, malhonesteco de oficistoj, alvokoj al la prezidanto ne efikas, kaj tial la nivelo de subteno ne estas alta.

Sed aliflanke, ili ne povas nomi iun ajn pli bonan aŭ pli fortan. Kaj Vladimir Zelenskij, kompreneble, estas miliardon da fojoj pli bona ol Putin, pri kiu ukrainoj ĝenerale ĉesis kompreni, kiel tia estaĵo povus ne nur esti prezidanto, sed eĉ esti nomata humanoida.

Parolante pri renkontiĝo en Ameriko, oni devas surprizi la usonan stilon de bonvenigado de gastoj (vulgaraj demandoj pri kial la prezidanto de militanta lando ne aĉetis multekostan kostumon por la kunveno, ripetaj interrompoj de la gasto ne nur de Trump, sed ankaŭ ial de Vance, postuloj pri dankemo, agresemaj postuloj pri pago por helpo asignita jarojn antaŭe). Dum la semajno de ĉi tiu akcepto, J.D. Vance prelegis al eŭropaj politikistoj pri kiel demokratio devus esti respektata kaj ĉiuj, eĉ la plej radikalaj opiniportantoj, devus ricevi la ŝancon elparoli. Sed nun ni vidas, kion valoras liaj vortoj en la praktiko - ili klare ne intencis lasi paroli la Prezidanton de Ukrainio.

Mi ankaŭ atendis pli da preparo kaj ĝentileco de Vladimir Zelenskij en lia konversacio kun Trump - la vivoj de ukrainaj armeanoj kaj civiluloj dependas de ilia decido.

Sed kio okazis jam estas en la pasinteco. Por mi kaj samideanoj, la problemoj de la venontaj 4-8 jaroj fariĝis pli evidentaj: estas pli granda probableco iri en malliberejon (aŭ esti mortigitaj), pli granda probableco ke ukrainoj proksimaj al mi mortos. Nu, sed nun estas fidinda reala bildo de la mondo.

Mi esperas, ke Dio kaj racio helpos la popolon de Usono malhelpi tion, kio okazis ĉi tie en Rusujo, eble ili ankoraŭ eliros el la kruelaj vokoj de la Muskoj kaj Vancoj (ĉi tiuj du ankaŭ ne estas konataj pro empatio).
Mia sendo de leteroj komence de la milito influis ankaŭ la usonanojn, sed nun mi ne korespondas kun neniu el tiuj, kiuj respondis al mi. Okazis, ke el mia granda specimeno,

mi sukcesis konservi longdaŭrajn ligojn kun Japanio (kun vi), kun Anglio, kaj Francio, kaj ŝajnas, ke mia praktika sperto koincidas kun la reala sinteno de landoj pri tio, kio okazas en la mondo.

世界戦争を止めよう（33-3）<原文> 2025 年 3 月 2 日

トピック：米国大統領執務室のスキャンダル：アメリカは今や 10 年前のロシアに似ている

3. 私の周囲には、権力欲の強い現在の大統領と似た性格の人が何人かいたように思います。こうした知り合いから多くの利益があったが、害も少なからずあった。私の経験から、私は人に対する愛よりもプライドが高い人とは近づかないようにしています。彼らが信じられないほど効果的で精力的であることはわかっていますが、彼らの活動は、彼らの目先の名声や自己重要性の感覚（現実か架空のものかにかかわらず）を強化するものでなければなりません。遅かれ早かれ、チームや国の長期的な利益は、そのような自己中心的な人々の利益と衝突することになります。

国や集団の将来はそのような人々に依存しません（彼らは常に最終的には目にするものすべてを破壊しようとします）。国の将来は、システムがどのように構築されるか、そして大統領に建設的に反論する意志のある強い人物が社会に存在するかどうかにかかっています。

プーチン大統領はロシア国内のそのような反対派の人物たちを殺害した。トランプ氏は多くの点でプーチン氏に似ている。彼もまた権力に固執しており（就任当初から 3 期目の出馬の可能性に困惑していた）、独立した報道機関を好んでおらず、移民の運命に対しても残酷で、人々を憐れむことを知らず、人間関係よりも金銭を優先している。今日のアメリカに関するニュースを聞いていると、私は既視感を感じます。10 年前、私たちは皆、ロシアでこれを経験しました。報道機関の迫害と国の法律の書き換えです。神が私の意見が間違っていると望むならば。 私には、この二人の大統領は他人に共感することを知らず、他人の人生に痛みを感じていないように思えます。また、彼らの人生には価値ある愛がなかった（ボディランゲージなど多くの面でそれがはっきりと見て取れる）と私は信じています。そして、なぜか彼らの妻やガールフレンドは、ボディーセールスの世界の出身者（「モデル」、「女優」、「アスリート」、そしてスチュワーデス 1 人）です。

私はウラジミール・ゼレンスキーのほうがずっと良いと思います。しかし、ウクライナ人の女性の友人に、ゼレンスキー氏のウクライナでの得票率は本当に 4%しかないのかと尋ねたところ、彼女は、おそらく 30～50～70%が彼を完全に信頼しているだろうと自信なさげに答えた。彼女は多くの中小企業家とコミュニケーションを取っているが、彼らは賄賂、汚職、役人の不正行為に非常に憤慨しており、大統領への訴えは効果がなく、そのため支持のレベルは高くない。

しかし一方で、彼らは自分より優れた、あるいはより強い人物の名前を挙げることができない。そしてもちろん、ウラジミール・ゼレンスキーはプーチンより何十億倍も優れている。プーチンについては、ウクライナ人は一般に、そのような生き物が大統領であるだけでなく、ヒューマノイドと呼ばれることさえできることを理解できなくなっている。

アメリカでの会談といえば、アメリカ人のゲスト歓迎スタイル（交戦国の大統領がなぜ会談のために高価なスーツを買わなかったのかという下品な質問、トランプ氏だけでなく何らかの理由でヴァンス氏によるゲストの度重なる妨害、感謝の要求、何年も前に割り当てられた援助金の支払いの強引な要求）に驚かされるに違いない。このレセプションの週に、J.D.ヴァンス氏は欧州の政治家に対し、民主主義は尊重

されるべきであり、最も過激なオピニオンリーダーであっても、誰もが発言する機会を与えられるべきだと説いた。しかし、今や彼の言葉が実際にどのような価値を持つかが分かる。彼らは明らかにウクライナ大統領に発言させるつもりはなかったのだ。

私はまた、ウラジミール・ゼレンスキー大統領がトランプ大統領との会談でもっと準備と礼儀を示すことを期待していた。ウクライナの軍人と民間人の命が彼らの決断にかかっているからだ。 しかし、起こったことはすでに過去のことです。私や私と同じ考えを持つ人々にとって、今後 4～8 年間の問題はより明白になってきています。刑務所に行く（あるいは殺される）可能性が高くなり、身近なウクライナ人が死ぬ可能性も高くなります。さて、今、世界の信頼できる現実の姿があります。 神と理性が、ここロシアで起きたことを防ぐようアメリカ国民を助けてくれることを私は願っている。

おそらく彼らは、マスク夫妻やヴァンス夫妻（この二人も共感力に優れていることでは知られていない）の残酷な呼びかけから逃れられるだろう。

戦争の初めに私が送った手紙もアメリカ人に影響を与えましたが、今では返事をくれた人たちとは一切連絡を取っていません。たまたま、私の大規模なサンプルのうち、日本（あなた方）、イギリス、フランスと長期にわたる関係を維持することができたのですが、私の実際の経験は、世界で起こっていることに対する各国の実際の姿勢と一致しているようです。

**Haltigu la mondmiliton (33-4) <originalo>**

*2-a de marto 2025*

Temo: Kiu kulpas pro la mortoj?

4. Kiel mi lastatempe eksciis, tri el mia firmao aliĝis al la rusaj trupoj kiel soldatoj komence de la milito, kaj lastatempe venis novaĵo, ke unu el ili mortis aŭ estis mortigita. Mi ankaŭ aŭdis de pluraj konatoj, ke ili jam havis plurajn junajn virajn konatojn mortigitajn en la milito. Ĉiuj bedaŭras la vivojn mallongigitajn, sed ili prefere malamus tiujn, kiuj protestas kontraŭ la milito, ol Putin, kiu deĉenigis la murdojn.
Verŝajne, ĉiuj kune estas la kolektiva Putin. Kion fari? - Ĉio estas sama: skribu kaj komprenu librojn kaj poezion, faru prelegojn kaj malfermajn kunvenojn, projektojn, edukadon, serĉadu samideanojn (preskaŭ ĉio neeblas, sed necesas almenaŭ iom progresi). Evoluigu homaron el vi mem kaj la homoj ĉirkaŭ vi, kaj ne en malhomecon.

Bonvolu, mi havas al vi peton - se eble, kara Goro, foje skribu pri vi mem, pri viaj aferoj kaj ideoj - foje mi vere volas almenaŭ mense viziti landon, en kiu oni ne mortigas homojn, en kiu ili vivas feliĉe.

Ĝis!
Kore

世界戦争を止めよう（33-4）<原文> 2025 年 3 月 2 日

テーマ：死の責任は誰にあるか?

4. 最近知ったことですが、私の会社の 3 人が戦争の初めにロシア軍の兵士として参加しましたが、そ

のうちの 1 人が死亡したか殺害されたというニュースが最近入りました。また、何人かの知人から、戦争ですでに何人かの若い男性の知人が亡くなったという話も聞きました。誰もが命が短く奪われたことを残念に思っているが、殺人を繰り広げたプーチン大統領よりも、戦争に抗議する人々を憎むだろう。おそらく、彼ら全員が一緒になってプーチン大統領となるのでしょう。何をするか？ – すべては同じです。本や詩を書いて理解し、講義や公開会議を行い、プロジェクトを実行し、教育し、志を同じくする人々を探します（ほとんどすべては不可能ですが、少なくとも何らかの進歩を遂げることは必要です）。自分自身や周囲の人々から非人間性ではなく人間性を育んでください。

お願いがあります。できれば、親愛なるゴローさん、時々あなた自身のこと、あなたの出来事や考えについて書いてください。時々、少なくとも精神的には、人々が殺されず、幸せに暮らしている国を訪れたいと思うことがあります。 また後で！

 

*Honoré Sebuhoro (honsebn@gmail.com)*

## LA REĜO DE LA ARBARO

Iun tagon, la vivo repagos al ni. Kaj tio, kion ni ricevas, dependos de tio, kion ni donis. Do, dum ni havas elekton, ni estu humilaj.
Ni respektu tiujn kiuj ĉirkaŭas nin kaj lasu markon, kiu igos nin iu, kiun oni memoras kun amo, ne kun rankoro.
La vera grandeco ne estas en forto, sed en humileco.

*Honoré Sebuhoro kaj DR Kongolando*

森の王

いつか、人生は私たちに報いてくれるでしょう。そして、私たちが受け取るものは、私たちが何を与えたかによって決まります。ですから、私たちには選択肢がある限り、謙虚でありましょう。 私たちの周りの人々を尊重し、恨みではなく愛をもって記憶されるような人物になれるような足跡を残しましょう。
真の偉大さは強さではなく謙虚さにあります。

オノレ・セブホロ（コンゴ民主共和国）